



Enhavo

- Norvegio elpaŝas por Skandinavio!
- AMO 69 kaj 70 cele al jarfino
- Eduka borso – ligi kursojn kun instruistoj
- Hispanio pluiras brave – nova estraro

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-52 sendita el Budapeŝto, la 10an de novembro

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Eŭropo, specife Skandinavio – la necesa rejunigo

Tuj sekvos du gravaj kunsidoj pri tiu esenca temo. La unua estas virtuala kunsido organizita de la Landa Asocio de UEA, la Norvega Esperanto-Ligo, kiu montras novajn signojn pri aktiveco. La dua estas la prokrastita Seminario pri Aktivula Maturigo, okazonta en Pollando, sed ankaŭ grandparte virtuala. Ambaŭ aranĝoj teknike prizorgataj per Zoom de la Landa Asocio en Irano (kontakto: s-ro Ahmad Mamduhi). Jen la informoj pri ambaŭ:

Norvegio: Renovigo de la skandinava komunumo

Dato: 21a de novembro (sabato)

Horoj: Ekde 15:00 CET ĝis 17:00.

Platfomo: la 69a AMO-seminario. (la unua seminario en Norvegio!)

Planata programo:

15:00 Enkonduko, bonvenigo (Norvegio)

15:10 Prezentoj Svedio, Danlando,
Finnlando kaj Norvegio (po 10
minutoj)

15:50 Prezento SMG (per lumbildoj)

16:05 Perspektivoj por restarigo de
sekcioj de TEJO

16:15 Perspektivoj por la refortigo de
sekcioj de ILEI

16:25 Perspektivoj por pliaj fakaj agadoj kaj organizoj

16:35 La preskaŭa malapero de la skandinavaj lingvoj
en super edukado

16:50 Diskuto kun formala fino je 17:00 kun neformala babilado poste.



Plankunsido en la Eo-Centro de
Lesjöfors, Svedio – plej facile alirebla
tra Norvegio!)

Konigo de la aliro al Zoom: tion prizorgos la norvega asocio (NEL)

Pollando: Varbado de junuloj en Europo

Dato: 28a de novembro (sabato)

Horoj: Ekde 14:00 CET ĝis 18.00.

Platformo: la 70a AMO-seminario.

Planata programo:

14:00 (CET): Malfermo: Enkonduko SMG (mi pretigis kaj aktualigos lumbildojn).

14:30 - La kontribuo de la ĵurnalista asocio TEĴA– Alfred Schubert.

15:15 –Loko rezervita por ILEI aŭ aliaj Fakaj Asocioj.

15:45 –Diskuto pri la du sesioj kaj formulo de rekomendoj.

16:00 – Du-hora prezento de TEJO: Charlotte Scherping, Klara Ertl, Tomáš Stano.

1. Liveri efikan aktivulan trejnadon – kampo en kiu TEJO havas sperton
2. Diskutigi la nunan staton de nia komunumo kaj la perspektivojn
3. Analizi ĝiajn fortojn kaj malfortojn (FLAM-analizo)
4. Reliefigi la ĉefajn defiojn kaj laborkampojn por la movado.
5. Formuli rekomendojn por konsili la movadon, precipe pri aliro al rimedoj.

Konigo de la aliro al Zoom: tion prizorgos la patro de AMO.

Kiu volas partopreni en unu aŭ ambaŭ eventoj, nur sendu peton al <stefan.macgill@gmail.com>kaj <oficejo@esperanto.no>. Ĉiu, kiu jam petis de SMG aliron por la virtualaj seminarioj 63 ĝis 68 aŭtomate ricevos la alir-informojn.

Bezono kaj livero –por ekonomoj; por edukistoj

Jam de jardeko EKO kaj AMO rekomendas la starigon de ‘Eduka bazar’, kiu unuflanke registros kursdonantojn kune kun ĉiu esenca informo, aliflanke la

organizantoj de eventoj, kiuj entenas lingvo-kursojn. Tiel ke unu trovu la alian. Nun laŭ sugesto de Ahmad Reza Mamduhi dum VEKI konkretigite per Mireille Grosjean kaj la prizorgantoj de la paĝaro www.eventaservo.org ekzistas iaspeca borsejo por trovi instruistojn kaj/aŭ prelegantojn. https://eventaservo.org/instruistoj_kaj_prelegantoj

ankaŭ enirpaĝe vi vidas ĝin. <https://eventaservo.org/> en la dua linio vi povas alklaki ĝin.

Ĉiu instruema homo, ĉiu kursplananto, anoncu tie siajn bezonojn kaj kondiĉojn!

Eventa Servo Aldoni eventon Organizo Subteni Novaj Pri ni Ensaluti / Registriĝi

Instruistoj kaj prelegantoj

Jen alfabeto listo de instruistoj kaj prelegantoj kiujn vi povas kontakti por via evento. Iuj homoj pretas senpage instrui kaj/aŭ prelegi, aliaj petas repagon de vojaĝkostoj aŭ etan financan rekompencan. Foje eblas veni surloke; aliaj pretas aŭ povos pro praktikaj kialoj nur rete agi. En la ĉi-suba listo vi trovos nomojn de homoj kiuj estas pretaj vin helpi. Detalojn vi trovos ĉe la respektivaj uzantoprofiloj.

Instruistoj

<p>Adonis Saliba Brazilo baza meza supera Kreinto kaj administranto de Programo Mia Amiko</p>	<p>Andrzej Romuald Pacholski Pollando meza supera Klasika filologo, iam asistento en la Instituto pri Lingvistiko de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznań, Pollando. Nun pensiulo.</p>	<p>Eduardo Alonso Navarro Hispanio baza</p>
<p>Elisabeth Le Dru Francio baza meza supera Mi starigas por progresantoj studperiodojn per moderna ludiga metodo, kiu miksas gramatikajn</p>	<p>Esperanto-Centro Herzberg Germanio baza meza supera Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar: plurjardeka aktiva rolo kiel instruistoj, kursgvidantoj.</p>	<p>Fernando Ŝajani Brazilo baza Mi instruas bazan Esperanton en mia urbo.</p>

Unuiĝintaj Nacioj – UEA fidele komunikas

Kun ioma malfruo pro la tumulto da envenintaj informoj:

[Informilo 48 – septembro-oktobro 2020](#)

- Monda Festivalo de Esperanto rompis antaŭtimojn kaj gajnis tutmondan partoprenon
- Universala Esperanto-Asocio eldonis gvidilon al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo
- Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Paco 2020
- La Esperanto-komunumo festis la voĉojn de Indiĝenaj popoloj okaze de la Internacia Tago de Indiĝenaj Popoloj en aŭgusto 2020
- UEA esprimis sin okaze de la 75-a datreveno de la nukleaj atakoj sur Japanio.

Daŭrigo de la materialoj el AMO 68

Malofte okazas en la AMO-programo – ni havas ĉiujn el la prezentaĵoj pri la Esperanto-Centroj. Ni aldonas ilin al EKO unu post unu. Ni jam sendis tiun pri Seulo, Koreio. Jen la prezentaĵo de la Eo-Centro en Vroclavo. Restas por sendi tiun pri Rumonge en Burundo. Tiu pri Herzberg am Harz en Germanio estas ricevebla laŭpete (9 MB eĉ post sveltigo).

Ondo da informoj – rete alireblaj

La aŭtuna (laŭ la nord-hemisfera vidpunkto) eldono de “La Ondo de Esperanto” (№305), aperinta komence de oktobro kaj legebla laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”, estas rekorde ampleksa – sur ĝiaj 123 paĝoj estas sesdeko da diverstemaj tekstoj kaj multaj bildoj. Legu pli pri la aŭtuna Ondo ĉe <https://sezonoj.ru/2020/10/ondo-68/>

Jam eblas aboni “La Ondon de Esperanto” por la 2021a jaro. La abonantoj ricevos kvar ampleksajn ĉiusezonajn numerojn (ĉ. 120 paĝoj) kaj literaturan suplementon. La abontarifo restis la sama kiel en la 2020a jaro; legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2020/11/ondo-71/>



Nova estraro en Hispanio – aktivado daŭrigenda

Nia hispana landa asocio estas unu el la pli (plej)? aktivaj tra la kontinento precipe en la kultura kaj ret-uza sferoj. Nova teamo estas, por pluporti la torĉon.

La 18an de oktobro 2020 Hispana Esperanto-Federacio okazigis Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kies ĉefa tagordero estis la renovigo de la estraro. La nova estraro estis elektita unuanime, kaj konsistas el jenaj homoj:

- Prezidanto: **Ángel Arquillos**; Vicprezidanto: **Alberto Granados**
- Sekretario: **Manuel Parra**; Vicsekretario: **Isidoro Ortega**
- Kasisto: **Jesús M. García Iturrioz**
- Pliaj estraranoj: **Vicente Manzano, Ana Manero, William Guerrero** (junulara sekcio)



===== Vortoj: 780 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.